# LA VERDA LUPEO FENIKSO

N-ro 50 | 3/1980 Septembro | 11a jaro













*Rene Descartés 1596–1650 skribis: "Arta lingvo estas ebla, kaj oni povas trovi sciencon, formulantan ties principoj. (en Harmonie universelle).*

# Kluba informilo de ELF–AREK

## ELF: Esperanto Ligo Filatelista

## AREK: amika rondo de Esperantaj-kolektantoj

---

## Esperanto-filatela konferenco 1981

ELF-AREK invitas klubajn geamikojn partopereni renkontiĝon en kastelo "Hubertus", Valtice, regiono Breĉlav, CSSR de 13–15.3.1981.

El la programo:
Interkona vespero kun vizito de kastela vinejo, laborkunsido pri internacia kunlaboro kaj propagando de E-kolektado inter neesperantistoj, vizito al kamparana vinkelo en Hlohovec, ekskurso.

Valtice estas urbeto kun 4mil enloĝantoj kaj situas rekte apud landlimo inter Aùstrio k CSSR. Pliajn detalojn ricevas aliĝantoj. La hotelo havas la internacian kategorion B kun steleto.

Unulita ĉambro kostas 75 Kronoj, dulita 112 kronoj. Eblas manĝi por 50 kronoj potage (kpl). Eblas, veni pli frue kaj resti pli longe.

Oni devas aliĝi ĝis maksimume 31.1.1981 por povi mendi hotellitojn.

En tiu renkontiĝo partoprenos ankaŭ membroj de E-filatela sekcio ĉe Asocio de ĉehaj filatelistoj.

Bonvolu, kontakti nian amikon Vlada Hasala
CS-691 42 Valtice
telefono: 94528

## Velingrad

En "Bulgara Esperantisto" 10/1979 ni povas legi:
"Junpionira festivalo en Velingrad
En junio pli ol 180 junpioniroj el la tuta lando kolektiĝis en la urbo de Vela – nia senmorta popola heroino kaj arda esperantistino, pereinta en la granda kontraŭfaŝisma batalo . . . Ili venis kun siaj Esperantaj kantoj kaj versoj . . ."

Leginte tiun noton mi ekmemoris pri tio, ke tiu urbo en Bulgario ricevis sian nomon Velingrad (urbo de Vela) pro la meritoj de la fama bulgara esperantistino Vela. Cetere ankaŭ ekzistas bulgara poŝtmarko pri Vela. Niaj E-filatelistoj do nepre atentu tiun fakton, ĉar eĉ la normala lokal poŝtstampo apartenas al filatela kolekto pri Esperanto.

## Hungara esperantisto-kosmonaŭto

Nun ni Epserantistoj finfine povas esti kontentaj ĉar ni havas nian verdan kosmonaŭton (astronaŭton). Post Jules Verne, kiu estis simpatianto de Esperanto, kaj Karlo Ciolkovski, teoretikulo de kosmonaŭtiko k membro de siatempa Sovetlanda Esperanto Unio, nun ni filatele povas dokumenti ke tria elstara homo en la astronaŭtiko havis rilaton al Esperanto: la hungara kosmonaŭto-esperantisto Farkaŝ. Jam aperis poŝtmarko kaj bloko pri li en Hungario, eble ankaŭ en Sovetunio.

Pri pliaj detaloj ĉirkaŭ Farkaŝ legu "Budapesta Informilo".




## Stampo-bukedo

### Nova el Sorokaba/BRA

La vigla Esperanto Klubo en la brazila Sorokaba denove iniciatis poŝtan memorigan Esperanto-stampon kiu tekstas:

"IIIa ENCONTRO DA JUVENDADE ESPERANTISTA BRASILEIRA DE 23 A 27 DE JANEIRO DE 1980, ECT, SOROCABA SP"

La bildo en la stampo prezentas homon malantau pentagono kun mapo pri Brazilo en la mano.

Ekzistas memoriga koverto kun bildo pri la stampo kaj teksto pri la organizintoj.

### GFR kun IPA-stampo

"SERVO PER AMIKECO" = tiu slogano aperas esperantlingve en la insigno de "International Police Association". Tiu ĉi insigno nun denove aperis en memoriga poŝta stampo, kiun la federacigermana poŝto uzis en Koblenz okaze de la 25-jara jubileo kaj kongreso de IPA kun la dato de 12.4.1980.

Kelkaj ekzempleroj estas en nia stampo-banko.

La stampistoj bonege laboris k faris tre purajn stampojn.

La filatelistoj malpli bone agis. Oni ekz. afrankis per nura 5-pfeniga pm, kaj mi tre pridubas, ĉu en FRG tio konvenas al iu poŝta tarifo. (En GDR 5 pfenigojn kostas presaĵo enlanda.)

### La dua stampo sen pm

Multaj el inter ni, ankaŭ mi, tre ŝatis duan stampon sen pm sur koverto au poŝtkarto por povi pli bone legi kaj prezenti ĝin. Sed, laŭ la nuna "trendo" de filatelistoj, tio estas stultaĵo kaj "filatele farita". Prefere oni evitu pecojn, kiuj havas stampon sen pm, en konkura ekspozicio.

### Esperantostampo, sed ne en katalogo

Kvankam la hungara filatela gazeto informis, ke ekzistas poŝta Esperantostampo pri la 12a pacmarŝo en Szentes, organizita de esperantistoj, la hungara poŝto fuŝis kaj aperigis stampilon sen iu ajn videbla rilato al Esperanto. Jes, hungarlingve oni notis pri 12a pacmarŝo, sed tio ja ne sufiĉas. Tial tiu stampo bedaŭrinde ne trovos lokon en nia stampo-katalogo. Pri la stampo afable informis kaj sendis ĝin nia kluba amiko Stefeno Fekete el Budapest.




## Grenoble 1977 kun tria tipo

Post la normala kaj kapopieda prezento de la Grenobla E-poŝtstampo (FRA /«) jen ĝi triatipe.

La prikongresa parto de la maŝinstampo estis ankaŭ muntita sur maŝino, kiu celis retronuligi la poŝtaĵojn, kiuj, ĝis tiam, eskapis el la normala poŝtnuligo. La kutima ronda datstampo kun horindiko estis anstataŭita per kvadrata ondolinia stampilo, kiu, en la mezo, indikas "38 Grenoble/Centre de Tri" (38 Grenoblo, poŝtdispartiga centro = 38 estas poŝta kodcifero de la departmento Isére, kies ĉefa urbo estas Grenoblo).

En sufiĉe gravaj francaj urboj la poŝtaĵoj estas kolektataj surstrate aŭ en kvartalaj poŝtoficejoj. Kie ajn ili estas kolektataj kaj poŝtstampataj, ili ope alvenas en departementa dispartiga poŝtcentro kaj, de tie, iras a la adresitoj. Poŝtaĵoj, kiuj estas kolektataj en urbopartoj, kiuj senpere apartenas al tiujdepartmentaj dispartigaj poŝtcentroj estas tie poŝtstampitaj.

La koverto, kiun mi posedas, estis enpoŝtigita en alia urbo au, almenaŭ, en Grenobla poŝta distrikto, kiu ne apartenis senpere al la poŝtdispartiga centro. Do, kiam ĝi tie alvenis erare ne poŝtstampita, la pm estis nuligita per tiu maŝinstampo. Sed tiu nuliga poŝtstampo povis indiki nek horon nek daton. Tiuj datoj de la enpoŝtigo ja ne estis konataj.

(Similaj stampiloj ekzistas ĉe germana poŝto "Nachträglich entwertet – poste nuligita" sed rondaj kaj kun dato k horo de alveno en koncerna poŝtejo. Red.)

Jen do pri la muteco kaj la historio de la stampo, kiu meritas katalogan subnumeron.

*– Amouroux –*

## Kiu konis Butorin?

En "Bulgara Esperantisto" 12/1979 ni legas nekrologon pri forpaso de dr. V. Butorin, kiu mortis fine de oktobro 1979 en Novosibirsk. Esperanton li lernis en la fruaj 20aj jaroj en Barnaul. Li agadis kiel propagandanto, kursgvidanto kaj aparte kiel filatelisto. Ofte doktoro Butorin prelegis pri filatelo kaj esperanto kaj tiel sukcese kontribuis por la disvastigo de Esperanto.

Ankaŭ ni klinas niaj kapojn antaŭ la hela memoro de nia al ni ne konata esperanto-filatelisto Butorin.

## Esperanto-filatela agado en Sovetunio

"Filatelia" (OFICIALA ORGANO DE SOVETUNIAJ FILATELISTOJ) en numero 1/1980 havas ampleksan artikolon pri E-filatelo verkitan de A.S. Dubin (historisto). La artikolon akkompanas bukedo da koloraj bildoj pri E-pm kaj E-tutaĵoj.

Dubin skribas pri fondito kaj fondiĝo de Esperanto kaj pri E-filatela agado. Li mencias la filatelistan sekcion ĉe Moskva internacia esperanto-klubo, fonditan 1979. Pere de Yvert-katalog-numeroj li prezentas k priskribas E-pm. Li ne forgesas la tutaĵojn, ofte multe pli raraj kaj pli valoraj ol la pm.

Li mencias sciencistojn kaj filozofojn el pasintaj jarcentoj, kiuj revis pri universala lingvo kaj pri elstaraj adeptoj de Esperanto. Spacon li ankaŭ dediĉas al la poŝtaj E-stampoj. Ni tre sincere kaj kore gratulas la aŭtoron pro la sukcesa artikolo, kiu tutcerte alportos fruktojn por ni.

## Stampo pri Koloĉaj (GDR 8)

Kálmán Kalocsay estis hungara medicinisto kaj elstara esperantisto. Sendube ni ĉiuj scias pri li. Nun la poŝto de GDR honorigis lin per memoriga portreta poŝta stampo okaze de la "II-a konferenco de Medicina Fakrondo Esperanto en Kulturligo de GDR" (6–8.6.80 en Karl-Marx-Stadt/GDR). La stampilo funkciis 5–11.6 en la centra stampejo de la ĉefpoŝtejo.

La stampo prezentas portreton de Kalocsay kun stetoskopo kaj ĝi tekstas germanlingve: "2. Tagung der Mediziner-Esperantisten" 9010 Karl-Marx-Stadt 1.

La stampo ekzistas en nigra kaj en viola, krome mi trovis en stoko mendita de filatela tutaĵklubo de GDR (2500 ekz.!) ĉirkau 70 pecojn kun fuŝdato 11.16.80 (16a monato . . .)

Mi klopodas, akiri kelkajn por nia klubo.

La stampejo ne estis alirebla por la publiko.

La konferencon partoprenis 50 med-esperantistoj el GDR kaj pluraj gastoj el PO, CS kaj HU. Prezidanto de med-fakrondo estas d-ro Giso Brosche, kiu ankaŭ iniciatis poŝtan stampon kaj tutaĵojn.

### Koloĉaj-poŝtkarto

Organiza Komitato de la med-konferenco kun speciala ŝtata permeso aperigis okaze de uzado de speciala stampo pri Kalocsay surpreson pri Kaloĉsay sur normala pk en nominalo de 10 pfenigoj.

Teksto: Kálmán Kaloĉsay (1891–1976) eminenta hungara
medicinisto-esperantisto
Eldonkvanto: 4mil

2 500 aĉetis la filatela tutaĵklubo de GDR, la aliajn prenis la esperantistoj.

### E-med-konferenca poŝtkarto


Teksto: Medicina Fakrondo de C.L. Esperanto
IIa KONFERENCO Karl-Marx-Stadt 6–8.6.1980
Eldonkvanto: ĉ. 1 000


ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
E
SETUBAL·CTT
13.6.80
PORTUGAL
$50


IFJÚSÁGI ESZPERANTÓ TALÁLKOZÓ
JUNULARA ESPERANTO RENKONTIĜO
JER
E
TATA 1980 V.2.


CENTJARO DE ZAMENHOF
BRAZILO CORREIOS RIO DE JANEIRO
15
XII


66a
UNIVERSALA
KONGRESO DE
ESPERANTO
JULIO 1981
BRASILIA




## Pri "mortinta" stampo de Kubo

Pli fruaj E-stampo-katalogoj ankaŭ enhavis lokon por stampo el Kubo. Nia laste eldonita de 1978 tamen ĝin elĵetis ĉar nin atingis informoj, ke ĝi estus fantaziaĵo. Nia kolego Figueredo en Kubo, sendube fakulo pri filatelaj aferoj, sendis al redaktoro jenan leteron pri tiu stampo:

. . . La stampo (verda inko) "Unua Tago-Esperanto", el Camagüey, havas privatan originon. Certe ĝi ne estas poŝta stampo, ĉar ne estis aŭtorizate de Kuba PTT-ministerio. Faris ĝin du esperantistoj sen ia ajn rilato kun la estinta Club Filatelico de la Republica Cuba, la sola filatela organizaĵo ekzistinta tiumomente en Kubo, kies stampoj havas filatelian valoron. La stampo de Cmagüey estas fantaziaĵo . . .



## ELF/arek-kunveno:

La kunveno en kadro de 65-a Universala kongreso okazis laúplane la 5-an de aúgusto je la horo 9,30 en salono "Kalocsay".

Ĉeestis pli ol 50 personoj:
Post salutvortoj de nia prezidanto Paulsson, nia amiko Kosieniak gvidis la kunvenon.

Oni esprimis la laúdon pri la nuna gvido de la klubo, kaj dankas la redaktoro Burmeister por la bona redaktado de nia informilo.


Hasala invitis al kunveno en Valtiĉe, CS en marto 1981.

Post unuhora diskutado, komencis viglan interŝanĝadon de diversaj objektoj: Esperanto-poŝtmarkoj, E-insignoj, E-stampoj ktp.

Do kelkaj intencas viziti ankaú 66-an UK en Brazilia, oni esprimis deziron ankaú aranĝi kunvenon dum venonta UK.

*I.P.*

**Nova stampo de MALTO (n-ro 2) kontrau du IRK havebla per:**
John Vella Bondin, "Nova espero", New Street off Qormi Road, ST. VENERA, MALTA.
Detalojn pri ĝi en decembra numero.



## Ni salutas novan membron

Francisco Domenech Torregrossa, Goya 13, MURO DEL ALCOY (Alicante) Hispanio.
Li kolektas: poŝtmarkojn, glumarkojn, stampojn, revuojn ktp.
Ni deziras al li sukceson kaj fruktedonajn kontaktojn.
Bonvenon en nia amika rondo!

**Viola Bacon (GDR 7)**

La filatela tutaĵklubo de GDR mendis stokon da 2 500 stampitaj Bacon-poŝtkartoj. Kaj jen ni devis konstati, ke la poŝtistoj uzis violan kusenon por stampi tiun stokon.

Ankaŭ la Bacon-stampilo estis en por publiko ne alirebla stampejo de la urba ĉefpoŝtejo.

Cetere oni muntas la stampilon en la kapon de longbastona martelo kaj estas verŝajne granda arto, stampi per ĝi.

Tamen tiu metodo certe jam estas eksmoda aŭ malmoderna, ĉar la stampado ja postulas pezan laboro de homo, kaj tutcerte iu maŝino povus apliki la stampojn.

## Pri esperanto-gazetoj ("der esperantist")

Kelkaj niaj klubaj amikoj kolektas e-gazetojn. Iu demandis min pri antaŭmilita "der esperantist" kaj mi respondis, ke neniam ekzistis antaumilite tiu gazeto. Elstaraj E-fakuloj same opiniis kun mi (el GDR).

Nun mi tralegis "Germana Esperantisto" kaj en la novembra numero de 1909 sur la paĝo 130 mi trovis notojn pri la afero.

J. Borel notis, ke en la jaro 1908 la Esperantoklubo Leipzig aperigis novan gazeton "der esperantist", kaj aldonis, ke delonge li ne vidis ĝin. tio signifas: aperis nur kelkaj numeroj, ĉar neniam poste oni ĝin mencias.




**Pri Arnhema Esperanto Domo**

Ni amiko Amouroux sendis fotokopion pri poŝtkarto sendita al s-ino Isbrücker en la E-Domo de Arnhem.

La pm estis stampita en alia urbo, pk ricevis alvenstampon (nian E-stampon) kaj trian stampon de Gravenhage du tagojn post (22.7.37). La poŝtkarton oni post-sendis al la s-ino I. Sur la poŝtkarto troviĝas ankoraŭ kvara stampo, kaj tiu estas por ni interesa kaj esplorinda: temas pri verŝajne t.n. poŝtkontora stampo dulinia kun la teksto:

ESPERANTO DOMO ARNHEM

Tiu stampo havas la saman koloron kiel nia jam konata E-poŝta stampo

Ni petas nian kluban amikon Dolfa Bartoŝik, klarigi al ni la aferon. Li ja deĵoris siatempe, ĝuste en tiuj jaroj, en tiu Esperanto Domo.

**Pri Cordoba 1972**

La 17a argentina Esperanto-Jarkunveno kun 120 delegitoj okazis 1972 en Cordoba. Kunvenejo estis la Komunuma Palaco kaj tie funkciis ankaŭ dum 4 tagoj speciala poŝtagentejo kun memoriga Esperanto-stampo.

OK petis siatempe specialan poŝtmarkon (ankaŭ por Rosario 1973) sed ne sukcesis.

## Esperanto-filatela agado en Kubo

"Filatelia cubana" (organo oficial de la federacion filatelica cubana) en la aprila numero de 1980 aperigis 10-paĝan artikolon pri "Esperanto y Filatelia" el plumo de Hector Juarez Figueredo. La aŭtoro sukcesis prezenti en tre bona maniero la temon Esperanto, kaj li skribas pri fondiĝo de Kuba Esperanto Asocio, pri antau-historio de Esperanto kaj ĝia evoluo, La dua ĉapitro pritraktas la Esperanto-filatelon, Oni trovas notojn k klarigojn pri ĉiuj E-pm kun katalogaj (Yvert) numeroj, pri poŝtaj E-stampoj kaj reko-etikedoj. Plie oni trovas notojn pri ELF, verda lupeo kaj stampo-katalogo nia.

Bildoj pri 19 diversaj E-pm, 40-gr-E-pk de Pollando, UTK de PRAGA 1962 kun la E-pm, maksimum-karto de svisa E-pm kaj la Galenus-E-tutaĵon el GDR akompanas la artikolon.

Ni tre sincere kaj kore gratulas la aŭtoron de tiu ĉi artikolo pro la bonega prezento de nia afero en filatela gazeto.

## Grandega glumarko-kolekto havebla

Le plej granda kolekto de Esperanto-glumarkoj estas akirebla. Temas pri dekunumil (11 000) diversaj Esperanto-glumarkoj en 10 albumoj. Interresuloj sin turnu al Paulsson. Minimuma prezo estas 1 500 germanaj markoj.

**Novaj glumarkoj**

IFER 80 (haveblaj per Radnai)
Esperanto-jes
Atomenergio-ne dankon
Sveda E-kgr 1980
Junulara E-renkontiĝo Tata
5-a Esperanta Printempo
Soltau 1980
IFEF-kongreso 1981

**Nepoŝtaj E-stampoj**

AE SSR, 8a kongreso en Preŝov 1980
7a E-Feriado en Miedzydroje
32a IFEF-kongreso
46a itala E-kgr
47-a itala E-kgr

**Adres-ŝanĝo**

Nia kluba amiko, sinjoro KURIYAMA, Hitosi en AMAGASAKI-SI, 661 Japan, nun loĝas en la strato "Minami-Tukagutityö 7-23-9". Forstreku la antaŭan straton Kuriyama Kobata.

## Novaj sta el Hungarlando

### Junulara

Temas pri HU 73 el Tata, menciita jam en nia informilo n-ro 49.

### Fervojista

HU 74 venas el Dunakeszi, apudurbo de Budapest. Tie okazis 5an kaj 6an de julio la "16a fervojista esperanto renkonto" en la kadro de la tradicia "tago de fervojistoj". La renkonto okazis en la "Atila"-kulturcentro. El "Budapesta Informilo" 4/1980 ni ekscias, ke OK preparis ekspoziciojn pri foto, esperanto kaj filatelo.

6an de julio funkciis en la renkontejo "porokaza poŝtficejo" kun nia stampo HU 74. La stampo estas dulingva: esperante kaj hungare. Montras ĝi en terglobo radiantan E-stelon, insignon de hungara fervojo, iun konstruaĵon kaj du vagonojn. Por konstati du lastajn detalojn necesas havi ege puran stampon pro la miniaturega prezento. Uzita estas tiu stampo nur 6an de julio kaj ĝi havas diamtron de 35 milimetroj.

### Someruniversitata

HU 75 venas el la sudorienthungara Gyuala, situanta apud la fiŝoriĉa rivero Körös. Tie okazis de la 6a ĝis 12a de julio 1980 la tradicia "Somera Esperanto Universitato" (18a). "Budapesta Informilo" 5/80 informas, ke okazis prelegoj pri komponisto Bela Bartok (de Pechan), pri "aktualaj problemoj de la lingva komunikado en la sciencoj" kaj "problemoj de la Danuba-baseno". Ekskursoj kondukis al hungara stepo kaj al rivero Körös. Inter alie la OK "zorgis pri poŝtdeĵoro". En kiuj tagoj, ne estas konate. Stefano Fekete sendis stampon kun la dato de 7.VII.1980 Temas pri sama stampo de pasintaj jaroj. Blazonforma, supre la teksto HUNGARIO 1980, sub ĝi malgranda blazono de SEU, sub ĝi teksto GYULA, 1980.VII.7., kaj sub tio E-stelo. Maldekstre la teksto SOMERA ESPERANTO UNIVERSITATO, dekstre la sama en hungara lingvo. Bedaúrinde, ke la poŝtistoj en Gyula ne kapablas apliki purajn stampojn.

## "Popola Fronto" kun Renn

Ludwig Renn estis konata germana verkisto kaj esperantisto. Tion pruvas liaj originalaj E-poemoj kaj, ke li estis prezidanto de la "Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto Verkistoj". Li partoprenis la hispanan militon kaj estis staba ĉefo de la 11a Internacia Brigado.

Foje aperis en la E-gazeto "Popola Fronto" faksimilo de propramane skribita mesaĝo de Renn, per kiu li sendis salutojn al esperantistoj en la tuta mondo el Valencia en la jaro 1937.

Kiu posedas tiun numeron kaj ĝin au fotokopion de koncerna titola paĝo povas sendi al la redaktoro? Bezonate tiu numero estas por sekvontjara ekspozicio.

## Julio Mangada Rosenörn

Li estis prezidanto de la Hispana Epseranto Asocio ĝis 1937, batalis kiel generalo kontraú la faŝista Franco, 1939 elmigris al Meksikio kaj kun Lanti k.a. tie laboris por Esperanto.

Mangado-Rosenörn havas grandajn meritojn en la Esperanta literaturo. Kiu posedas portreton de li kaj povus ĝin disponigi al la redaktoro? Bezonata ĝi estas por eventuala portreta poŝta E-stampo okaze de ekspozicio.

## ELF-AREK

**Prezidanto:**
Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3
Poŝtkonto 51 57 85-4, I. Paulsson, Solna

**Redaktoro:**
Burmeister, DDR-9047 Karl-Marx-Stad, W. Firl Str. 30

**Kotizo por 1980:**
15 internaciaj respondkuponoj validaj aŭ 30 svedaj kronoj.
Sendu al Paulsson.

**Stampobanko:**
Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4
Aĉetas novajn stampojn kun lautarifa afranko kontraŭ 1 IRK kaj ofertas multajn novajn kaj malnovajn stampojn. La profito de la stampobanko servas plene por ELF-AREK (UEA-kotizo, preskostoj).

**Danko:**
Ni kore dankas al ĉiuj karaj geamikoj, kiuj kontribuis al tiu ĉi numero:
E-klubo Sorocaba, Heimlich, Fekete, Bellalta, Brosche, Amouroux, Figueredo, Dubin, Kuba Esperanto Asocio, Gimelli, Radnai, v.d. Veen, Bialek.

---




*La angla filozofo Francis Bacon ellaboris "skemon de universala lingvo".*